

Ĉapitro 4: Letero

Prepositions

§1 Prepositions are the little words used to join parts of a sentence, and to show the relationship between those parts. For example:

La kato sidas. *The cat sits.*

La tablo. *The table.*

We can use a preposition to join these two parts, and to show where the cat is sitting in relation to the table:

La kato sidas **sur** (*on*) la tablo.

La kato sidas **sub** (*under*) la tablo.

La kato sidas **apud** (*near*) la tablo.

La kato sidas **antaŭ** (*before, in front of*) la tablo.

The prepositions **sur**, **sub**, **apud** and **antaŭ** denote where the cat is sitting in relation to the table: they are called *prepositions of place*.

§2 Prepositions can also show relationships other than place, such as **al** (to), **de** (of, from), **kun** (with), etc. One of the most useful is **je**, whose meaning is indefinite. It is used where the relationship is obscure or cannot be clearly expressed by other prepositions:

Ŝi vetas **je** ĉevaloj. *She bets on horses.*

Li kredas **je** Dio. *He believes in God.*

It is often used with times:

Mi ne laboris **je** tiu tago. *I did not work on that day.*

Li venos **je** la tria horo. *He will come at three o'clock.*
(literally, "at the third hour")

The indirect object

§3 We've talked about **-n** marking the direct object. But with some verbs, like *give* and *send*, for example, we not only give or send something; we also give or send it *to someone*. This someone is called the *indirect object*:

Subject	Verb	Direct obj.	Indirect obj.
----------------	-------------	--------------------	----------------------

La patro	donas	pupon	al ŝi.
<i>The father</i>	<i>gives</i>	<i>a doll</i>	<i>to her.</i>

La amiko	sendas	leteron	al li.
<i>The friend</i>	<i>sends</i>	<i>a letter</i>	<i>to him.</i>

§4 The indirect object may be placed before the direct object. In such cases “to” is usually omitted in English, but **al** is always included in Esperanto:

Subject	Verb	Indirect obj.	Direct obj.
----------------	-------------	----------------------	--------------------

La patro	donas	al ŝi	pupon.
<i>The father</i>	<i>gives</i>	<i>(to) her</i>	<i>a doll.</i>

La amiko	sendas	al li	leteron.
<i>The friend</i>	<i>sends</i>	<i>(to) him</i>	<i>a letter.</i>

The past tense

§5 When an action or state has already occurred, the verb ends in **-is**:

Mi skrib**is** al vi hieraŭ. *I **wrote** to you yesterday.*

Li parol**is** al ŝi hieraŭ. *He **spoke** to her yesterday.*

La urbo est**is** plena. *The town **was** full.*

§6 As we saw with the present tense, English often uses *compound* past tenses formed with “has”, “have”, “was”, and “were” (e.g. “I have seen”, “I was reading” etc.) While Esperanto has similar compound tenses, (we’ll see them in a later chapter) the simple ending **-is** is more commonly used:

Ĉu vi vid**is** tiun libron?

Have you seen that book?

Mi leg**is** la libron.

I have read the book. (or) I was reading the book.

Sinjoro Lang sid**is** kaj leg**is**.

Mr. Lang was sitting and reading.

§7 The word **jam** (“already”) may be used to indicate the “has/have” form:

Mi **jam** skribis al vi.

I have (already) written to you.

Li **jam** legis la libron.

He has (already) read the book.

Praktiko 4.1 Translate into English:

La patrino donis du belajn ludilojn al Maria. Amiko sendis al mi leteron. La arbo estis antaŭ la domo. La kato sidis sub la tablo. Ĉu vi vidis ĝin? Ne, mi ne vidis ĝin. Ĉu vi legis tiun libron? Jes, mi jam legis ĝin. Kiu sendis al ŝi la leteron? La domo estis plena hieraŭ.

Praktiko 4.2 Translate into Esperanto:

In the house were six large rooms. I saw Andreo in the garden. Did you see him? I have-seen Maria in the children’s room. I have already seen her. She was-playing. I did not see Mr. Lang yesterday. He was not in the house. Have you seen Mrs. Lang? Yes, I saw her yesterday. Where was she? She was-sitting in the park. Did you see that car? It was-traveling very fast. I sent a letter to Mrs. Brown. I sent her a letter yesterday. She read it at three o’clock. The small cats were-sitting on the new tables. The dog was-sitting near the window.

Praktiko 4.3 Match the answers to the questions:

- | | |
|--|------------------------------------|
| 1. Ĉu vi vidis Andreon en la infanejo? | a. Ne, mi legas malrapide. |
| 2. Ĉu vi jam legis tiun libron? | b. Mi legis tiun libron. |
| 3. Ĉu sinjoro Brown laboris en la ĝardeno? | c. Jes, li donis al ŝi ludilon. |
| 4. Ĉu la patro donis ludilon al Maria? | d. Ne, li sidis en la salono. |
| 5. Ĉu sinjoro Lang sidis en la salono? | e. Mi legis bonan libron. |
| 6. Kie sidis sinjoro Lang? | f. Li sendis leteron al mi. |
| 7. Kiun libron vi legis? | g. Jes, li sidis en la salono. |
| 8. Kian libron vi legis? | h. Li sidis en la salono. |
| 9. Ĉu vi legas rapide? | i. Ne, sed mi legas ĝin nun. |
| 10. Kion sendis la amiko? | j. Ne, mi vidis lin en la ĝardeno. |

Possessive adjectives

§8 The personal pronouns (“me”, “you”, “he”, etc.) can be made into adjectives by the addition of **-a**, becoming “my”, “your”, “his”, etc.:

mia my, mine	nia our, ours	lia his
via your, yours	ŝia her, hers	ilia their, theirs
	ĝia its	

Mia patrino parolis al **via** patrino.

My mother spoke to your mother.

Lia libro estas dika, kaj **ŝia** (libro) estas maldika.

His book is thick and hers (her book) is thin.

Nia hundo estas bela, kaj **ilia** (hundo) estas malbela.

Our dog is beautiful and theirs (their dog) is ugly.

§9 In order to differentiate “my” from “mine”; “your” from “yours”, etc., the article **la** may be used with the latter:

Jen via libro.	Jen la via.
<i>Here is your book.</i>	<i>Here is yours.</i>

The future tense

§10 When an action or state will occur in the future, the verb ends in **-os**:

Mi skrib**os** al vi morgaŭ.
I will write to you tomorrow.

Li parol**os** al ŝi baldaŭ.
He will speak to her soon.

La urbo est**os** plena.
The town will be full.

The direct object with correlatives

§11 Kiun, kion, kian

Just as with nouns, **-n** is added when a correlative word is the direct object.

		Subject	Verb	Object
Kiun li vidis?	=	Li	vidis	kiun?
<i>Who did he see?</i>		<i>He</i>	<i>saw</i>	<i>who?</i>
Kiujn librojn ŝi legas?	=	Ŝi	legas	kiujn librojn?
<i>Which books does she read?</i>		<i>She</i>	<i>reads</i>	<i>which books?</i>
		Subject	Verb	Object
Kion ni trovis?	=	Ni	trovis	kion?
<i>What did we find?</i>		<i>We</i>	<i>found</i>	<i>what?</i>
Kiajn leterojn ŝi sendis?	=	Ŝi	sendis	kiajn leterojn?
<i>What kind of letter did she send?</i>		<i>She</i>	<i>sent</i>	<i>what kind of letters?</i>

More correlatives

§12 **Kial** (*why, for what reason*) and **tial** (*therefore, so, for that reason*)

Kial li skribis leteron?
Why did he write a letter?

Tial mi skribis al li.
Therefore (for that reason) I wrote to him.

Mi pensas, **tial** mi ekzistas.
I think, therefore I exist.

Note: don't confuse **tial** (for that reason) with **ĉar** (because).

Mi manĝos, **ĉar** mi estas malsata.
I will eat because I am hungry.

Mi manĝis, **tial** mi ne estas malsata.
I ate, therefore I am not hungry.

§13 re-

re- indicates repetition of an act, or the return of a person or thing to its former place or condition (like English “re-”):

legas	<i>reads</i>	re legas	<i>re-reads</i>
donas	<i>gives</i>	re donas	<i>gives back</i>
iras	<i>goes</i>	re iras	<i>returns (goes back)</i>
venas	<i>comes</i>	re venas	<i>returns (comes back)</i>

(Note that *return* can be translated by either **reiras** or **revenas**, depending on the sense required.)

§14 ĉi

Ĉi is a tiny word used to indicate nearness. You will most often see it with the **ti-** correlatives:

tie	<i>there</i>	ĉi	tie	<i>here</i>
tiu	<i>that</i>	ĉi	tiu	<i>this</i>


Note: **ĉi** may be placed either before or after the **ti-** word: **ĉi tie** or **tie ĉi**

§15 Scias, konas

Both these verbs mean “to know”, but *scias* means to know a fact, while *konas* means to be acquainted with something (usually a person or place):

Mi **konas** lin, sed mi ne **scias**, kie li loĝas.
I know him, but I don't know where he lives.

Text: Letero



S-ro* kaj s-ino Lang jam lernis la fundamentojn de Esperanto, kaj s-ro Lang serĉis amikojn en eksterlando. Kial li serĉis? Ĉar tiel li uzos la lingvon. Li ĵus ricevis leteron el Norvegujo. Sur la bildo vi vidas paĝon de la letero. Tie la norvega amiko skribas pri la familio. Sur la alia flanko de la papero li skribas pri la urbo Voss:

Nia urbeto Voss staras sur la belega fervojo de Bergen al Oslo.

Apud la urbo kuŝas la lago Vangsvatn, en la mezo de altaj montoj.

Ĝi estas bela centro por turistoj kaj sportuloj. Precipe la junuloj kaj junulinoj vizitas nin. En Norvegujo ekzistas multaj junul-gastejoj. Sed ankaŭ la maljunuloj trovas interesojn ĉi tie. Ili kaptas fiŝojn en la lago, kaj rigardas la multajn historiajn domojn.

Feliĉe, la urbo ne forgesis pri eduko. Ni havas kelkajn bonajn lernejojn, kaj ankaŭ kolecion.

Nu, mi sendas koran saluton kaj bondeziron al vi kaj via familio.

Sincere via, Edvard

* The standard abbreviations are: **S-ro** Mr., **S-ino** Mrs./Ms., **Ges-roj** Mr. and Mrs., **F-ino** Miss.

S-ro Lang estas tre kontenta pri la letero kaj la bela poŝtkarto. Li ofte relegas la leteron. Baldaŭ li skribos respondon. Li dankos la norvegan amikon pro lia letero, kaj reciproke sendos al li informon pri la urbo Newtown. Kaj pri la familio Lang!

Praktiko 4.4 Translate into English:

Mi jam lernis la fundamentojn de Esperanto. Nun mi korespondas kun amiko en eksterlando. Mi ĵus ricevis leteron kaj mi baldaŭ skribos respondon. Tiel mi uzos Esperanton. Norvega amiko, Edvard, skribis leteron al sinjoro Lang. Li skribis pri la urbeto Voss, en kiu li loĝas. Tiu ĉi urbeto staras sur la fervojo de Bergen al Oslo. S-ro Lang estas la edzo de s-ino Klara Lang. Ges-roj Lang estas geedzoj (*ge-edzoj*). Mi ricevis multajn leterojn kaj poŝtkartojn el eksterlando. Mi havas amikojn en multaj landoj. Mia amiko estas junulo, sed li ne estas sportulo. Ĉu ekzistas multaj junulgastejoj en Norvegujo? Mi ne scias. Kion faras la maljunuloj? Ili kaptas fiŝojn en la lago. Ili ankaŭ rigardas la multajn historiajn domojn. Ĉi tie en mia urbo mi ne kaptas fiŝojn. Ĉu vi scias kial? Ĉar tiu ĉi urbo ne staras apud lago.

Praktiko 4.5 Translate into Esperanto:

Do you correspond with a friend (*female*) abroad? Have you received a letter? What did she write? Where does she live? Does she live in Norway? Where did the friend of Mr. Lang see the announcement? What did he write? Did he write in Esperanto? Will Mr. Lang reply soon? What will he write about? What will he send? What are your chief interests? Are you a sportsman? What are you? Do you often re-read letters? Does Mr. Lang often re-read the letter? Do you know Mr. Lang? Do you know where he lives? Do you know whether he has received a letter?

Praktiko 4.6 Vera aŭ malvera? (*True or false?*)

1. S-ro Lang ricevis nur unu leteron el Norvegujo.
2. Li jam skribis respondon.
3. Edvard loĝas en granda urbo.
4. Li havas tridek unu jarojn.
5. Li loĝas en nova domo.
6. La lago Vangsvatn kuŝas en la mezo de altaj montoj.
7. La urbo Voss havas kelkajn kolegiojn.
8. Precipe la gejunuloj vizitas la urbeton Voss.
9. S-ro Lang ofte relegas la leteron.
10. S-ro Lang loĝas en Newtown.

Dialogo: Amiko el Norvegujo

Mr. Lang has invited his pen pal Edvard Olsen to spend a holiday in Newtown, and he meets Edvard at the station.

S-ro Lang: Saluton! Ĉu vi estas Edvard?

Edvard: Mia kara Rikardo! Fine mi renkontas vin! Tio estas granda plezuro por mi!

Rikardo: Ankaŭ por mi! Venu; mia aŭto staras ekster la stacidomo.

Edvard: Dankon, Rikardo.

Rikardo: Ĉu vi komforte veturis?

Edvard: Tre komforte, dankon.

* * *

Rikardo: Nu, jen ni ekster mia domo. Envenu, mi petas! Ha, Klara, jen mia norvega amiko Edvard Olsen.

Klara: Vi estas tre bonvena, sinjoro Olsen.

Edvard: Ne "sinjoro", mi petas! Mi estas Edvard.

Klara: Tre bone, Edvard. Nun, Rikardo montros al vi vian ĉambron, dum mi finos* la vespermanĝon. Ĝi baldaŭ estos preta.

Edvard: Dankon, Klara. Mi vere estas malsata.

Rikardo: Venu, Edvard! ... Jen via dormoĉambro. Mi esperas, ke vi trovos ĝin komforta. Ĉi tiu ŝranko estas je via dispono, kaj ankaŭ tiuj du tirkestoj. Kaj la banĉambro estas ĉi tie!

Edvard: Mi scias, ke mi bone dormos ĉi tie.

Rikardo: Nu, venu al la salono kiam vi estos* preta, kaj se la vespermanĝo ne estos* preta, vi sidos komforte dum vi atendos*. Mi helpos Klaran en la kuirejo.

Edvard: Dankon, amiko. Mi baldaŭ estos preta.

Rikardo: Ĝis poste, do!

Edvard: Ĝis poste.

* Note how the future tense is used. In English, some actions that occur in the future are described with the present tense, e.g. "while I finish dinner". For these cases we use the future tense in Esperanto.

Demandoj

1. Kie s-ro Lang renkontas la norvegan amikon?
2. Kie staras la aŭto de s-ro Lang?
3. Kiu estas bonvena?
4. Ĉu Edvard komforte veturis?
5. Kion faros s-ino Lang dum Edvard iros al la dormoĉambro?
6. Kiam la vespermanĝo estos preta?
7. Kion s-ro Lang esperas?
8. Ĉu tri tirkestoĵ estas je la dispono de Edvard?
9. Kion faros Edvard kiam li estos preta?
10. Kion la du amikoj faros se la vespermanĝo ne estos preta?

Vortolisto

amik/o friend
anonc/i announcement
 anonco an announcement
apartament/o apartment
apud beside, near to
atend/i to wait for, expect
bondeziro good wish(es)
bonvena, bonvenon! welcome
eduk/i to educate, bring up
 eduko education
edz/o husband; **edzino** wife
ekster outside
 eksterlando abroad
ekzist/i to exist
el out of
esper/i to hope
feliĉ/a happy, fortunate
fin/i to finish [tr.]; **fine** finally, at last
fiŝ/o fish
forges/i to forget
fotografi/o photography
fundament/o foundation (of a subject)
gast/o guest; **gastejo** guest house, hostel
help/i to help
histori/o history
inform/i to inform
 informo information
jar/o year
je (see §2)
jus just a moment before
 mi ĵus skribis I have just written
kapt/i to catch
kar/a dear
kat/o cat
ke that (conjunction)
kolegi/o college
kon/i to know (be acquainted with)
korespond/i to correspond (write)
kor/o heart; **kora** cordial
kovert/o envelope
kun with
kuŝ/i to lie (down) [intr.]
lag/o lake
land/o land, country
leter/o letter
 leterportisto postman (see poŝtisto)
liber/a free
lingv/o language
muzik/o music

nom/o name
norveg/o a Norwegian
 Norvegujo Norway
oft/e often; **ofta** frequent
paĝ/o page
paper/o (piece of) paper
pet/i to ask for, request
plezur/o pleasure
port/i to carry
post after; **poste** afterwards
poŝt/o mail (*note the ŝ*)
 poŝtisto postal worker
 poŝtkarto postcard
 poŝtmarko postage stamp
precip/e mainly, principally
pret/a ready
pro for, because of
reciprok/a reciprocal, in exchange
renkont/i to meet
revu/o magazine
ricev/i to receive
rigard/i to look at, watch
salut/i to greet; **saluto** a greeting
 saluton! hello!
sat/a satisfied (of hunger);
 malsata hungry
sci/i to know (a fact)
send/i to send
serĉ/i to look for, seek
sincer/a sincere
temp/o time
tir/i to pull
 tirkesto drawer
turist/o tourist
turism/o tourism
uz/i to use
ven/i to come
ver/a true, real; **vere** truly, really
vesper/o evening
 vespermanĝo evening meal
vizit/i to visit

Esprimoj

je via dispono at your disposal
mi tre ĝojas I'm very glad
envenu, mi petas! come in, please!
ĝis poste till later